



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel.02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

JEN LA 200-NUMERO DE NORMANDA ESPERANTO BULTENO

La unua esperanto gazeto kiu aperis, komence de tiu jarcento, nomiĝis "Normanda Stelo". Antaŭ la 2a mondmilito, aperis en nia regiono Bulteno de la Normanda Federacio de Internacia Esperanto Ligo.

Post la milito, la 11an de Majo 1947, estis fondita en Evreux, okaze de esperantista kongreso, la Unuigo de Normandaj Esperantistoj (U.N.E.) kiu daŭre ekzistas; ties celo estis grupigi ĉiujn diverstendencajn esperantistojn kiuj loĝas en nia provinco. **U.N.E. decidis aperigi Normandan Esperanto Bultenon en oktobro 1947.** Do, nia bulteno estas nun 52 jaraĝa.

Relegado de antaŭaj bultenoj povus informi nin pri la stato de Esperanto movado en nia regiono. Bedaŭrinde, mankis arĥivisto kaj multaj dokumentoj kaj bultenoj ne estis kolektitaj kaj perdiĝis. Aktivuloj mortis kaj familianoj forĵetis en rubujon gazetojn, fotojn, librojn, poŝtmarkojn kaj aliajn valorajn dokumentojn.

De 52 jaroj, Normanda Bulteno aperas regule. Ĝi estis redaktita, tajpita, sendita de pluraj grupoj kaj aktivuloj. Ni citu, inter aliaj, Edgar Jouis, Janine Vincent, Jean Gibaux, Pierre Pottier, Pierre Lemarchand, Yves Nicolas ... La tasko ne estis ĉiam facila; pro manko da monrimedoj, ni uzis malnovajn tajpmaŝinojn, malbonkvalitajn reproduktaparatojn (Kiom da inkomakuloj sur papero kaj sur manoj!). Nun, dank'al komputero kaj fotokopiado, la laboro estas pli facila kaj la bulteno pli agrable legebla.

Ni esperu ke dank'al ĉies klopodoj, ni varbu novajn legantojn kiuj certigos la daŭradon de bulteno pli interesa kaj pli valora.

Longan vivon por Normanda Esperanto Bulteno.

Petro KIJŬ

FINE, REVIGLIĜAS ESPERANTO EN NORMANDIO

Jam de pli ol 10 jaroj, ni ofte plendis ke Esperanto "dormas" en nia regiono. Multaj grupoj vivetis aŭ eĉ malaperis pro morto de la lokaj esperantistoj kiujn ne anstataŭis novuloj. Nia asocia vivo estis nesufiĉa, niaj regionaj kongresoj fariĝis nur ĝeneralaj asembleoj. Nia administra komitato konsistis nur el kelkaj personoj kiuj devis plenumi samtempe 2 rolojn kaj niaj alvokoj al novaj kandidatoj estis vanaj.

Pro tio, nia pasintjara ĝenerala kunveno celis precipe serĉi solvojn. Ni decidis sendi leterojn al la ĉefaj membroj de ĉiuj grupoj por ilin inciti kandidatiĝi ĉi-jare. Tiu operacio sukcesis kaj multaj respondis favore.

Al tiu pozitiva fakto, ni povas aldoni ke en Malalta Normandio, pluraj novaj grupoj aperis dum la jaro, kun kontentiga membraro. Pro tio, ni povis organizi nian Ĝeneralan Asembleon en Saint-Lo. Dum tiu laborkunveno, ni reorganizis nian asocion; ni elektis novan komitaton kun 11 membroj; ni elektis junan kaj vigan prezidanton. Ni decidis organizi informkampanjon apud la kandidatoj al la Eŭropa Parlamento.

Do reviviĝas Esperanto en nia regiono. Por ke tio ne estu nur provizora revekiĝo, ni devos ankaŭ malfermi novajn kursojn en ĉiuj urboj de Normandio.

Pierre POTTIER
(eks-Prezidanto de U.N.E.)



RAPORTO PRI LA ĜENERALA ASEMBLEO DE UNUIĜO DE NORMANDAJ ESPERANTISTOJ EN SAINT LO LA 11an DE APRILO 1999

Tiu kunveno organizita de Esperanto 50 kaj ties Prezidanto Sro MORIO okazis en salono de la Domo de Asocioj en Saint Lo.

Matene okazis kunveno de estraro:

Pierre Pottier prezidanto de U.N.E kaj de la normanda federacio de U.F.E. prezentis la tagordon kaj insistis pri la nepra reorganizado de la normanda movado. Estas ankaŭ necese ke niaj membroj aliĝu naciajn kaj internaciajn asociojn (UEA, SAT, UFE, FET, ktp..) kaj junuloj aliĝu al JEFO, TEJO. Li precizigis por eventualaj novaj kandidatoj ke la estraro kunvenas minimume 2 foje jare kaj devas plenumi la taskojn deciditajn dum tiuj kunvenoj.

André Morio proponis helpi Petro Kijo por la redaktado de la bulteno. Christian Levesque sin proponas por prizorgi eksterajn rilatojn precipe kun Malsupra Saksio kies urboj estas ĝemelitaj kun urboj de Normandio.

Posttagmeze: Ĝenerala Kunveno de U.N.E.:

Estas aprobitaj unuanime: la morala raporto legita de Pierre Pottier, la financa raporto de U.N.E. kaj la financa raporto de Normanda Federacio komentitaj de P. Quillaud. Pierre Jouvin kontrolis la kontojn de ambaŭ asocioj kaj certigas ilian ĝustecon.

Raporto pri la bulteno: P. Quillaud tajpas kaj reproduktas la artikolojn kiujn oni sendas al li. La grupo de Grand Quevilly / Rouen faldas kaj enkovertigas la bultenojn. La bulteno aperas regule dum marto, junio, septembro kaj decembro. La bulteno estas sendita al aliaj asocioj kaj federacioj. Ĝi estas ankaŭ sendita senpage al novuloj dum 1 jaro; sed poste, ni devis forstreki de niaj listoj tiujn kiuj ne pagas abonkotizon.

André Morio proponas sian helpon al P. Quillaud por redakti la bultenon. La raporto estas aprobita.

Renovigo de la estraro:

La novaj kandidatoj estas: André Morio (prezidanto de departemento 50), Christian Levesque (sekretario de departemento 50), Yves Bachimont el Caen por JEFO en malalta Normandio kaj Sébastien Erhard el Canteleu (76) por JEFO en alta Normandio.

Grupestroj aktivaj estos ankaŭ membroj de nia komitato

La ĉeestantaro akceptis la liston. Post la ĝenerala asembleo, la komitatanoj kunvenis por elekti novan estraron kaj novan prezidanton.

Estantaj agadoj:

- Ni decidis klopodi por akcepti fremdajn prelegantojn

- Post la internacia kongreso de fervojistoj en Le Mans, okazos postkongreso en Colleville sur mer (14); ni decidis sendi delegacion por saluti la kongresanojn kaj alporti al ili normandajn manĝeblajn kaj trinkeblajn specialaĵojn

- Memorial de Caen: Yves Nicolas informas pri la unuaj klopodoj por organizi Preleg-debaton pri la temo: "Kiu(j) lingvo(j) por Eŭropo ?" kun la partopreno de Claude Hagège profesoro ĉe Collège de France kaj Brian Moon membro de la Akademio de Esperanto. Tiu debato okazos la 22an de Junio.

- Esperantista Kultura Domo en Grésillon. Grandega sumo estas necesa por fari laborojn truditajn de la sekureckomisiono. U.N.E. kaj Normanda federacio donacas 1200 Frankojn por tiu celo

Voĉdonado por deputitoj de Eŭropa Parlamento: Ni devas profiti la okazon por kontakti kandidatojn de politikaj partioj kun la temo: "*unu komuna lingvo por Eŭropanoj*". Ni devas atentigi ilin ke ni ne deziras *unikan* lingvon Post diskutoj, ni akceptas la tekstojn preparitajn de Yves Nicolas. Ĉiuj komitatanoj ricevos la tekstojn kiujn ili devos reprodukti kaj sendi al politikaj partioj kaj al aliaj asocioj. Ni devos aldoni presitajn dokumentojn eldonitajn de JEFO; Petro KIJIO mendas ilin kaj sendos al grupoj (Bedaŭrinde, tiu materialo estis elĉerpita kaj ni devis kompletigi la dosieron per malplivalora materialo)

Rilatoj kun Malsupra Saksio: Malsupra Saksio havas partnerajn rilatojn kun Normandio. Ni devos inciti personajn kaj grupajn rilatojn kun niaj germanaj geamikoj. Christian prizorgos pri tio.

Laŭ Raporto de Christian Levesque

Dankon al niaj amikoj de Saint Lo kaj Manche kiuj tre bone organizis nian asembleon (P.Q)

Listo de komitatanoj elektitaj dum la Ĝenerala Kunveno en Saint Lo la 11/04/99

+++++

PREZIDANTO Yves NICOLAS 17/37 quartier du bois 14200 Hérouville Saint Clair
Tél. 02 31 95 11 81 yvanmi@club-internet.fr
Vicprezidanto: Pierre POTTIER 21, allée des roitelets 76190 Yvetot
Tél. 02 35 95 03 09
Sekretariino Sylvie CARON 44 rue Gustave Lennier 76600 Le Havre
Tél. 02 35 43 64 69
Kasisto kaj Bultenisto Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly
Tél. 02 35 69 66 09 pierre.quillaud@wanadoo.fr
Vicbultenisto André MORIO 631 route de Carentan 50000 Saint Lo
Tél. 02 33 05 11 99
Eksteraj Rilatoj Christian LEVESQUE, les épinettes St Michel des loups 50740 Carolles
Tél. 02 33 91 75 08

Kunordinantoj por junuloj:

Alta Normandio Sébastien ERHARD; 13 ter rue Raymond Botté 76380 Canteleu
Tél. 02 35 36 18 36
Malalta Norm.io Yves BACHIMONT 106 rue d'Orléans 14000 Caen
Tél. 02 31 75 15 74 YBachimont@esperanto.org
Kont-kontrolisto Pierre JOUVIN 14 rue Thiers 76120 Grand Quevilly Tél. 02 35 69 77 20

Aliaj membroj

Sylvie Bonnet, 6 Bvd Néhou 27700 Les Andelys
Tél. 02 32 54 64 32
Jean GIBAUD 28 rue Raoul Dufy 76600 Le Havre
Tél. 02 35 42 18 66
Marco TEANI 16 rue P. Bérégovoy 76380 Canteleu
Tél. ?
Mouloud TOULEB rue des oiseaux 76540 Elétot
Tél. kaj Faks 02 35 29 99 88

Por Orne (Dép. 61) Anne- Marie LEPREVOST 62 rue de la XI DB 61100 Flers

La komitatanoj de U.N.E. estas samtempe komitatanoj de Normanda Federacio kondiĉe ke ili estu membroj de Esperanto-France (U.F.E.)

Venonta kunveno de komitatanoj:

Ni antaŭvidis kunvenon de la estraro dimanĉon 24an de Oktobro je la 10a horo en Maison des Associations d'Hérouville

Nia sekretario konfirmos tion al vi post la ferioj

NUN la KASISTO:

Je prie les retardataires de bien vouloir régler leur abonnement/cotisation pour 1999

Dankon

KULTURA ESPERANTO DOMO (KASTELO GREZIJONO)

+++++

Janine Vincent (eks-Normandino el Les Andelys) nuna respondeculino pri Grezijono sendis al mi afablan leteron post ricevo de ĉekoj, donaco de Normandoj. Ĝi elkore dankas nin kaj skribas ke niaj kontribuajoj estas ege bonvenaj. Jam kelkaj necesaj laboroj estas faritaj por konformigi Grésillon je la sekurecaj normoj (fumflariloj, alarmiloj, elektra instalaĵo, alveno normigita de gaso) sed multo restas farenda kaj postulas multege da mono.. Do la kaso daŭre akceptas donacojn. Se vi volas ke Grezijono daŭru, estu malavaraj kaj sendu viajn ĉekojn, ĉu rekte al Grésillon, ĉu pere de la kasisto de U.N.E., skribante sur ĉekdorso : Donaco por Grésillon

NOVAĴOJ DE NORMANDAJ GRUPOJ

FECAMP

Niaj geamikoj TOUILEB Mouloud, Taous kaj gefiloj transloĝiĝis en vilaĝo ELETOT, sed daŭre aktivas por Esperanto:

-Dépôt régulier de la revue en langue française "ESPERANTO-INFO" à la bibliothèque de Fécamp

- Contrôle des emprunts effectués à la bibliothèque des ouvrages relatifs à l'Espéranto

"L'homme qui a défié Babel" a été emprunté 6 fois

Il serait bon que chacun offre un ouvrage à la bibliothèque de sa ville genre: Le Défi des langues, la biographie de Zamenhof, le "Que sais je?" de Pierre Janton

Taous propose une initiation à l'Espéranto dans l'association S.E.L. de Caux qu'ils viennent de créer.

Dans le cadre des élections européennes, nos amis ont envoyé une longue lettre à Madame Frédérique Bredin, députée au Parlement Européen (elle ne faisait pas partie des députés ayant apporté leur soutien à l'Espéranto), en argumentant que le droit à la communication est inscrit dans la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme

-Envoi à Madame Bredin de l'information concernant le débat avec Claude Hagège et Brian Moon à Caen. Affichage de cette info à la bibliothèque

Mouloud a écrit au chroniqueur Pierre Georges du journal Le Monde suite à un article intitulé "Un bicycliste à Paris" et relatif à la traduction automatique d'un message de Rick Bennett par un logiciel

CAEN:

La esperantistoj de la Caen-a regiono komisiis min vin informi por publikigo en nia Normanda Bulteno pri malgaja informo, la morto de nia samideano S-ro Gilbert ANGENAULT el Ver sur Mer (Calvados). Nia amiko neatendite forpasis je aĝo 80 jaroj, la 2an de Majo. Fervojisto, S-ro ANGENAULT fariĝis prezidanto de "Association Caennaise pour l'Espéranto" ekde Marto 1984. Dum multaj jaroj, li gvidis esperanto-kursojn en fervojista ejo apus la Caen-a stacidomo.

Komunuma konsilanto de Ver sur mer, li krome aktive okupiĝis pri la asocio de fervojistaj artistoj kaj tiukadre regule organizis tre vidindajn pentraĵajn ekspoziciojn en la stacidomhalo de Caen, en kiuj aperis ankaŭ... abunda informo pri Esperanto.

Henri ROUSSEAU

GRAND QUEVILLY / ROUEN:

Ĉiujāŭde, regule kunvenas la grupo kiu estas fako de laika amikaro. Plej ofte partoprenas la kunvenon 10 aŭ 12 homoj en tre amika etoso. (Bedaŭrinde, la membroj de eks-Rŭena Grupo neniam vizitas nin). Ĵaŭde, 17an de Junio, ni festis alvenon de somero trinkante Ŝaumvinon kaj cidron kaj manĝante kukojn; la festo finiĝis per esperantaj kantoj...kvankam ni ne estis ebriiĝintaj! Dum la lasta kunveno de la jaro, ĵaŭde 24an ni faldos kaj enkovertigos la bultenon kiun vi estas nun leganta. Ni ne kunvenos dum 3 someraj monatoj. Do ĝis la 7a de Oktobro! 2 membroj de nia grupo partoprenos la Universalan Kongreson en Berlino.

Dum la Ĝenerala Kunveno de Laika Amikaro, la prezidantino raportis pri ĉiuj aktivaĵoj de la asocio (sportoj, ŝakoj, artaj laboraĵoj, ktp.. kaj Esperanto). La raporto pri esperanto estis interesa: inter la ĉeestantoj estis la urbestro de Grand Quevilly :Laurent Fabius!

Mi sendis dokumentaron por Eŭropa Parlamento al 15 partioj, kandidatoj kaj responsuloj de asocioj. Mi ricevis respondon de F.Zimeray kiu ĵus estas elektita eŭropa deputito, kaj kiu estas urbestro de Petit Quevilly; li skribas:

Monsieur le Président,

J'ai bien reçu votre courrier ainsi que la lettre du Conseil d'Administration de votre association jointe à la documentation sur l'Espéranto. Je vous remercie de me l'avoir fait parvenir. J'en ai pris connaissance avec le plus grand intérêt

Je vous prie...etc

François Zimeray

ESPERANTO NORMANDIE VOUS SOUHAITE UN BEL ÉTÉ ET DE BONNES VACANCES.

PRATIQUEZ L'ESPERANTO DANS LES CONGRES, À GRESILLON, À BOURESSE..ktp

INFORMOJ PRI LA "MANIKO"

- "Esperanto 50", amike salutas vin. -

Tiu paĝo, kiun mi promesis fari, por helpi nian amikon "KIJŬ" troviĝos en ĉiu venonta bulteno. Vi trovos informojn, pri Dptaj aktivadoj E-istaj aŭ ne, ĉerpitajn en la gazetaro kaj kiuj interesas ĉiujn amikojn. Mi ankaŭ proponas al ĉiuj, kiuj ĝin deziras, enpresu en tiu paĝo, artikolojn, informdemandojn, aŭ anoncetojn. Kompreneble, vi devos sendi al mi tekston ĉu skribita per la lingvo, kiun ili deziras publikigi, ĉu preferinde per disketo (Word, Works).

Pri la ĝenerala Asembleo "UNE"

Ni estis tre kontentaj akcepti ĉiujn E-istojn el Normandio, kaj ni multe dankas vin. Se la Asembleo bone sukcesis, mi ne tro aprezis la menuon de la tagmanĝo. Ni jam manĝis tie, kaj neniam estis tiel kutima ol tiu ĉi fojo. Verŝajne, vi tion pensis. Mi povas nur bedaŭri, do. Pri la Raporto de la Kunveno, skribita de la sekretario vi legos ĝin en aliaj paĝoj. Mi nur memorigas al vi, koncerne nian grupeton de St Lo, 2 personoj konsentis partopreni estrarlaboron.

Christian Levesque kiu respondecas pri eksteraj rilatoj (Germane), kaj mi, kiel helpanto de amiko "KijŬ" por redakti Bultenon.

Pto de E-to 50

André

Tio estas la fina konkludo de Dua Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Pekino (Ĉinio)



Ĉerpita en artikolo elirita de Revuo
"El Popola Ĉinio" n° 4 - Avril 1989
Jen, la traduko

La neutralité de l'Esperanto sert la connaissance

Avant la fermeture de la conférence, j' ai interviewé le Pro Jiang Lijin, biochimiste chinoise réputée. Une Scientifique de 62 ans qui a appris notre langue deux semaines avant la conférence. Elle a déclaré: "selon moi l' Esperanto peut jouer un grand rôle dans le domaine de la Science et la Technique." Maintenant bien entendu, l' anglais est largement utilisé dans les entretiens, mais je pense que l'anglais et l'Espéranto jouent des rôles différents. Ceci a créé des facteurs psychologiques. Si dans les symposiums et autres réunions internationales, personne ne parlait sa langue nationale et tous ne parlaient qu' Espéranto, langue neutre, cela accélérerait le développement de la science et de la technique. " Elle a ajouté: j' approuve l' Espéranto. j' espère que je le parlerai plus couramment au 3a Congrès, pour parler plus librement avec les scientifiques des autres pays".




Autoro Liu Caisheng


"ESPERANTO 50"

L' Assemblée Générale ^{a eu} ~~aura~~ lieu au Centre Culturel - Place du Champ de Mars - Saint Lo
le 29 Mai 1999 à 17.30 h

PRI NIA PARTOPRENO AL LA EŬROPA ELEKTADO



Kiel dirite dum la Asembleo de UNE, ni sendis ĉiujn niajn dokumentojn al ĉiuj politikaj partioj, ankaŭ al ĉiuj kandidatoj de la Dpto 50, tiu agado povas ankaŭ konigi Esperanton al tiuj kiuj ĝin nescias.



Tiu artikolo ĉi sube, kiun mi legis hazarde, estas skribita en la rubriko "Courrier des lecteurs" en dumonata Franca /Angla revuo n° 153 de aprilo /majo * Normandie - Magazine *. Ĉu tia situacio okazos, kiam oni lernas Esperanton? Tute ne, precipe kiam oni uzas la K.S.M. servicoj ! aŭ Amikeca Reto.


Bone lerni la anglan lingvon postulas iri Anglion, kvankam la rezulto ne estas certa. Legu ! Kion vi opinias ?

CET HOMME EST DESESPÉRÉ

Jeune retraité cherche
correspondant anglais?

Je m'efforce sans succès de trouver une revue de langue anglaise traitant du tourisme et des traditions du Sud de l'Angleterre afin de souscrire un abonnement. Les kiosques de notre région présentent généralement des revues américaines. Etablir des liens, une correspondance, ou des rencontres avec des britanniques ne semble pas facile, pour un particulier s'entend. Les organismes se préoccupent en priorité des jeunes.

Cadre retraité, je m'intéresse à l'histoire Normande, un peu au droit anglais (droit de étymologie de la langue anglaise (mots française), aux monuments et traditions. La anglaise occupe une bonne place dans ma Je lis l'anglais, mais ne le parle pas, ou bien le pratiquer. Les lecteurs français et de Normandie -Magazine pourraient ils s'entendre.



A n'g l o -
l'homme), à l'
d'origine
littérature
bibliothèque.
mal, faute de
britanniques

Auteur de l'article Bonmartel 27610 Romilly - sur -Andelle

Esperanto in Niedersachsen



Mitteilungen des Esp.-Verbandes Niedersachsen

Nr. 2

Apr. - Jun. 1999

13. Jahrgang

MALSUPRA SAKSIO kaj NORMANDIO

Dum nia estrara kunsido en la Internacia Domo "Sonnenberg" (7/4/99) ni ankaŭ diskutis la staton kaj la eblan evoluigon de niaj rilatoj al U.N.E. La rezulton de nia pripensado mi sendis al la "Assemblée Générale des Espérantistes de Normandie à Saint Lo (Manche)" (11/4/99), tio estas: jara ĉefkunveno de la esperantistoj en Normandio en la urbeto Saint Lo en la subregiono Manche. Tien mi skribis:

"Ni pensis, ke malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj establi kaj havi kontaktojn sur interindividua ebena tamen povus esti valore, teni kontaktojn sur la ebena de la unuiĝoj. Mi mem spertas, ke mi kun granda intereso legas la "Normandan Bultenon", por ekzemple: impresis min la historio de Esperanto 50 ("50" estas la numero de la subregiono Manche), kaj la aranĝo de la "Forumo de Asocioj"... Valoras jam la nura legado. Alia penso (kaj sonĝo): ni observas en la partneraj rilatoj, kiujn tenas mia urbo Hildesheim, ke la rilatoj regule estas nur duflankaj, do aŭ Hildesheim al Angulemo, aŭ Hildesheim al Gelendjiko, ktp. Kaj en ĉiu kazo nur la lingvoj de la 2 partneroj estas uzataj, plejparte pere de tradukistoj. Se ni do dirus al iu ke ni tenas per Esperanto rilaton al franca asocio, oni demandus nin, kial ni ne aplikas la lingvon, kiun multaj Hildesheimanoj lernas en la lernejo. Esperanto ne impresus. Sed se ni povus montri al sinkronaj kontaktoj, kiujn ni havas per unu sola lingvo al asocioj de tri aŭ kvar landoj, tiukaze ni koncentriĝus al nova, pli ampleksa tasko. Kaj tiun taskon, oni nur povus solvi se oni uzas iun t.n. "Lingua Franca": la Anglan ...aŭ Esperanton. Tiun efekton ni ja spertas en la projekto de nia kajero "PONTOJ", kiu ja interligas grupojn de 4 diversaj lingvoj per Esperanto. Do nia sonĝo: ĉu estas dezirinde ankaŭ por vi krei aldonan, kroman kontakton al grupo aŭ regiona asocio en tria lando (en kiu oni parolas nek la francan, nek la germanan lingvojn), eble en Ruslando, Polio, Italio...? Nia demando: Kion vi pensas pri tia "reto" de kontaktoj trilandaj?... Pierre Quillaud kiun mi jam prezentis al vi en la lasta numero prizogas kotizojn, kontojn kaj la bultenon de U.N.E. Li jam respondis: "Eble, en venonta Normanda Bulteno mi aperigos alvokon por instigi Normandojn ekkorespondi kun Saksanoj. Via sugesto pri reto de kontaktoj trilandaj estas bonega; mi mem loĝas proksime de Rouen (partnera urbo de Hannover ekde 1966) kaj mi ignoris la ekziston de Esperanto grupo en la rusa urbo Ivanovo (partnera urbo de Hannover). Ni do devas cerbumi pri via sugesto" Kaj en alia reago el Normandio, ni povas legi: "...nia lasta kunveno estis pozitiva kaj ni povos esperi." Tion skribis S-ro Christian Levesque el Saint Michel des Loups, kiu zorgas pri la eksteraj rilatoj de U.N.E.

Do valoras denove kunlabori en la projekto "Normandio-Malsupra Saksio". Se vi, karaj gelegantoj, emas direkti vin al tiu tre ĉarma, alloga, vizitinda Franca regiono, certe kolego Christian Levesque ĝojus peri kontaktojn.

MI kore salutas vin

- Hans Fechner

Ĉi-supre vi legis ĉefartikolon eltiran el la bulteno de niaj saksaj geamikoj

Vi konstatas ke niaj germanaj kolegoj deziras starigi firmajn rilatojn inter niaj provincoj kiuj estas partneraj. Tiuj rilatoj ne devas koncerni nur kelkajn estarantojn sed ĉiujn membrojn de niaj asocioj.

La unua paŝo devas esti: individuaj rilatoj pere de korespondado, poste okazos reciprokaj vizitoj, sende de delegacioj, kaj kiel deziras Hans Fechner, disvastigo de tiu reto al 3a aŭ 4a lando.

Petro KIJŌ

Vous désirez un correspondant; choisissez plutôt la Basse-Saxe (région de Hannover). Faites le savoir à notre responsable des relations extérieures: Christian LEVESQUE Les épinettes Saint Michel des loups 50740 Carolles Tél. 02 33 91 75 08

YVETOT:

Informite pere de Intereto, ke pro reformprojekto de la pola instruado, la lernejo L.Zamenhof en Bjalistoko baldaŭ malaperos, Pierre POTTIER, kiel certe multaj aliaj esperantistoj el la tuta mondo, skribis al la urbestro de Bjalistoko kaj al la pola ambasadoro en Parizo por protesti, substrekante ke Pollando (kaj speciale Bjalistoko) devus esti fiera ĉar ĝi estas la naskiĝloko de Zamenhof kaj de Esperanto

Du monatojn poste, la ambasadoro de Pollando en Parizo respondis, skribante precipe tion: "D'après l'information qui nous a été donnée par les autorités scolaires, l'école élémentaire N°23 L. Zamenhof continuera son activité à la rentrée 1999 / 2000

NI RIDU...

Ili estas enamiĝintaj kaj rigardas sin kun multe da amo en la okuloj.

-Ĉio plaĉas al mi ĉe vi,- diras li. Via belega korpo kaj via spirito. Kaj kio al vi plaĉas ĉe mi ?

-Via bona gusto ! -ŝi respondas.

(El Sennaciulo de Junio 99)

LASTMINUTA INFORMO

**FREŜAJ IMPRESOJ PRI LA DEBATO EN MEMORIAL DE CAEN INTER
CLAUDE HAGEGE LINGVISTO KAJ BRIAN MOON DE E-AKADEMIO**



+++++

Hieraŭ vespere, marde 22an de Junio, mi ĉeestis la debaton organizitan de niaj geamikoj el Hérouville-Esperanto. Gratulojn al la organizantoj kiuj, -post multaj klopodoj-, sukcesis venigi grandnombran aŭskultantaron. Pluraj centoj da personoj amasiĝis en "auditorium" de la muzeo. Ne estis sufiĉe da sidlokoj ; kelkaj devis sidiĝi sur ŝtupoj. Multaj estis la esperantistoj de niaj normandaj grupoj sed ankaŭ venis samideanoj el aliaj regionoj. La ne-esperantistoj sendube venis allogitaj per la famenco de Claude Hagege.

Claude HAGEGE deklaris:

-Zamenhof eraris: la lingvoj ne estas kaŭzo de militoj (ekzemple: Jugoslavaj popoloj)

-Interveno de USONO dum la 2 mondmilitoj provokis superregon de angl-amerika lingvo. Anstataŭis Esperanton la lingvo de la lando plej potenca kaj aroganta.; li bedaŭras tion.

-Hagege sentas nenian entuziasmon por lingvo artefarita; li do ne emas aktivi por Esperanto. Tamen, se eŭropa aŭtoritato (parlamento, registaro aŭ alia instanco) decidus oficialigi Esperanton, li tute ne kontraŭstarus tiun decidon. (li do konfesas ke nia lingvo valoras).

-Lia prefero: li opinias ke multlingvismo estas la solvo por estonto de Eŭropo. Oni devus instrui 2 aŭ 3 el la 5 ĉefaj eŭropaj lingvoj (franca, germana, hispana, itala, rusa) al junaj infanoj. Por interesigi ilin, la instruado devus esti farata per alia lingvo: ekzemple, oni povus instrui historion aŭ geografion al francaj lernantoj pere de germana profesoro.

-Pro tio, ke li kontraŭas la invadon de anglusona lingvo, oni devus instrui la anglan poste kaj ne unue.

Claude HAGEGE elmontris sian kompetentecon; li kutimas prelegi, li estas tre lerta kaj li sukcesis plurfoje ridigi la ĉeestantaron. Li tamen sin montris kelkfoje aroganta kaj ironie malestima ekzemple kiam li sin turnis al nia amiko Pottier, nomante lin: "mia kara profesoro" aŭ "kara kolego"

Sed lerteco ne sufiĉas. Kiam oni scias la problemojn kiuj ekzistas en franca "Nacia edukado", la solvo de Hagege estas pli utopia ol la solvo Esperanto!

Brian MOON substrekis tion dirante ke ni batalas por utopio pli realista ol aliaj. Li malpli facile parolis ol Hagege, eble pro tio ke li estas denaske anglolingvano.

Mi ne scias ĉu ne-esperantistoj kiuj aŭskultis la debaton decidus studi nian lingvon sed ĉiuj aŭdis, -eĉ de Hagege-, ke Esperanto estas serioza lingvo kiu meritas atenton kaj indas debaton. Bedaŭrinde, tiaj debatoj neniam okazis dum la favora periodo de Eŭropa voĉdonado; neniam, televidprogramoj havis la temon: "Kiel interparolos la Eŭropanoj? "

Kiel redaktoro de nia bulteno, mi atendas por la septembra numero la opiniojn de aliaj kolegoj pri tiu debato. Verku tuj!

Petro KIJU